



**Universala  
Esperanto-  
Asocio**



**AKTIVULA  
MATURIGO**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

Ni bezonas kreskantan aron da aktivuloj, kiuj scias kunlabori internacie, malfermaj al novaj ideoj kaj al influoj kaj tendencoj en la granda mondo, pretaj lerni kaj adapti sukcesajn alilokajn projektojn al la propra loka situacio. Estas evidente, ke UEA devas ludi gvidan rolon en la plenumo de tiu celaro.

Esperanto inter lingvoj unikas. La parolkomunumo de naciaj lingvoj renovigas sin mem nature, kaj la lertigo de ties infanoj kaj junuloj okazas nature kaj intense en la familia kaj apuda medio, suplementata plej ofte per establita delonge funkcia kaj financata infrastrukturo. Esperanto havas avantaĝojn pro sia klareco kaj logikeco, sed gravajn malavantaĝojn, ĉar unike ni devas krei kaj maturigi niajn proprajn novajn generaciojn kaj reprodukto-mekanismojn, sen abundaj rimedoj. Kio mankas al ni ĉe rimedoj, ni kompensu per lerteco kaj supleco ĉe niaj agantoj.

Tial ni bezonas koheran kaj ambician planon de Aktivula Maturigo – laŭprononce: AMO. La planata projekt-simbolo videblas apude.

La programon ni nun evoluigas pere de la estrara subteamo MOVADO (kies celdifinon vi trovos en aparta dokumento: MOV-01). Ĝi estos la unua tereno en kiu la centra UEA provas intensigi siajn rilatojn kun siaj Landaj Asocioj (LA), kunlaborante krome kun Fakaj Asocioj (FA), Landaj Sekcioj de TEJO kaj ILEI kaj aliaj.

La programo funkcios pere de serio de seminarioj, laŭ konceptoj detalitaj en krea dokumentaro. Ilin loĝistike kutime prizorgos enlandaj asocioj, sekcioj aŭ E-Centroj; la programa realigo estos unuavice la tasko de UEA.

Seminarioj kreas raportojn, kaj kiam oportune, gvidilojn pri praktikaj taskoj, kiuj utilos al agantoj, kiuj ne povis partopreni en la koncerna seminario. Traktotaj temoj rilatos ĉefe pri publika konsciigo pri lingvaj rajtoj kaj nia lingvo-propono, interna komunikado kaj organizado, la starigo kaj gvidado de kursoj, k.m.a. La ampleksa tereno pri Instruista Trejnado restas ekster la gamo de la nuna programo – tio tiom gravas, ke ĝi bezonas apartan traktadon, kiun unuavice prizorgas ILEI, kun subteno de UEA.



#### **Pliaj dokumentoj en preparo:**

- AMO-01 La nuna enkonduko
- AMO-02 Seminarioj Pri Aktivula Maturigo –principoj
- AMO-03 Modela programo por dutaga seminario
- AMO-04 Modela programo por tritaga seminario
- AMO-05 Modela programo por kvintaga seminario
- AMO-06 Modelaj buĝetoj kaj organizaj modeloj.
- AMO-07 Petilo por okazigo de seminario
- AMO-08 Modela (ret)aliĝilo por seminario

#### **La subteamo MOVADO:**

Stefan MacGill, Hungario: (gvid.), Landaj Asocioj, Kapabligo.  
Lee Jungkee, Korea Resp.: Esperanto-Centroj, Azia Agado.  
Barbara Pietrzak, Pollando: Kulturo, Kongresoj kaj Aranĝoj  
José Antonio Vergara, Ĉilio: Fakaj Asocioj, Scienca Aplikado.